

**DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA**

Redakcio kaj administracio:  
Praha XIX., Uralské nám. 447.  
Telefona n-ro 718-41.

Redaktas:  
Dr. ST. KAMARYT  
Dr. A. PITLÍK

Senpage por membroj de  
Ĉs. Asocio Esperantista.  
Aperas sesfoje dum la jaro.

**INVITO**

al

**EKSTERREGULA ĜENERALA KUNVENO**

okazonta en Praha, la 9-an de decembro 1933  
je la 19. horo en kafejo Louvre, Národní tř. 20a.

**PROGRAMO:**

- 1) Necesaj aranĝoj pro aliĝo al U. E. A.
- 2) Ŝanĝo de statuto.

La kunveno estas decidrajta, se ĉeestas kvarono de membroj. Se ne kunvenis tiu nombro, okazas post unu horo nova kunveno, kiu estas decidrajta sen atento pri la nombro.

*Komitato de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.*

**Prezidanto de ĈAE  
dro Kamaryt — 50 jara.**

Ne ĉiam la vivo de opulo estas sole lia afero persona kaj privata! Kvankam la kultura vivo de la nacio kaj societo estas evoluata kaj prilaborata plejparte per komuna penado de multegaj nekonataj laborantoj, tamen ĝi ĉiam estas influata de opuloj, kies specialaj kapabloj kaj persista, celkonscia laboro antaŭdestinis ilin esti efektivaj aŭ almenaŭ spiritaĵoj gvidantoj de la nacio, movado aŭ societo.

Same okazas en la movado esperantista. Kvankam ĝian evoluon partoprenas amaso da nekonataj pioniroj, tamen ĝi portas — parte aŭ tute — ankaŭ la karakteron de siaj eminentuloj, de siaj gvidantoj.

Al ili sendiskute apartenas *prezidanto de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista dro Stanislav Kamaryt*, kiu naskiĝis la 10an de novembro 1883 en Velešín, urbeto en suda Bohemujo, naskiĝloko de la patriota pastro kaj poeto Josef Vlastimil Kamaryt, kies 100-jaran mortotagon oni ĉijare rememoris. Post la gimnaziaj studoj en České Budějovice, li vizitadis ĉeĥan universitaton en Praha, kie li fordonis sin al ĥemio, matematiko, fiziko kaj geografio. Nun li estas profesoro de la ŝtata reallernejo en Bratislava.

Esperantisto fariĝis dro Kamaryt en la j. 1900, ellerninte la lingvon laŭ la unua ĉeĥa lernolibro priesperanta, kiun en la j. 1890 eldonis F. V. Lorenz.

En la j. 1902 li partoprenis la konslituiĝantan kunvenon de Esperantista klubo de Praha, kies kasisto en la j. 1903 li estis elektita, kaj ĝis la j. 1907 funkciis kiel ĝia sekretario. En la j. 1908 dro Kamaryt kun s-o Bouška fondis Boheman Asocion Esperantistan, kies li estis ĝenerala sekretario kaj pli poste prezidanto. En la j. 1917, aranĝinte funebran memorleŝton pri † Zamenhoj, li provis vekti la ĉeĥan esperantistan movadon el la dumvilita dormo. Post la milito li kunlaboris je la kuniĝo de Bohema Asocio Esperantista kaj B. Unio E., kiu efektiviĝis en la j. 1920. Depost la fondiĝo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, la posteulo de B.A.E. kaj B.U.E., dro Kamaryt estis ĝia vicprezidanto, la 13an de aprilo 1930 oni elektis lin ĝia prezidanto kaj delegito en Konstanta reprezentantaro de la naciaj societoj. Dro Kamaryt funkcias ankaŭ kiel komitatano de Universala Esperanto-Asocio, ĝia delegito en Bratislava kaj ŝtata ekzamena komisaro de Esperanto ĉe la ŝtata ekzamena komisiono por popolaj kaj burĝaj lernejoj en Slovakio. Pro siaj lingvaj scioj li estis elektita ankaŭ Lingva komitatano.

En la j. 1907—1909 dro Kamaryt regule publikigadis en „Esperanto“ leterojn pri politikaj kaj kulturaj okazintaĵoj en Aŭstrio; li fariĝis responda redaktoro de la 3-a jarkolekto de „Bohema esperantisto“, kies 6-an jarkolekton li eldonis je siaj propraj kosoj. Post la revolucio li redaktis multajn petskribojn



Dro Stan. Kamaryt.

al la ĉs. ministerio por instruado kaj laris tie kelkajn intervenojn, kies rezulto estis la konataj ministeriaj decidoj pri la enkonduko de esperanto en la publikajn lernejojn kaj kreo al ekzamenaj ŝtataj komisararoj. En la j. 1921 li prezidis la XIII-an Universalan kongreson de esperanto en Praha.

Sed dro Kamaryt estas ankaŭ filozolia verkisto. Liaj verkoj „Mezinárodní jazyk“ (Internacia lingvo), „O dvojt pravdě“ (Pri duopeco de vero), „O jednoznačnosti mravního soudu“ (Pri unusenceco de morala propozicio) vekis merititan atenton. Lia esperantlingva „Filozofia vortaro“ estas eldonata. Krom tio li tradukas slovakingven, publikigas el psikologio kaj pedagogio, kunlaboris je Enciklopedia vortaro de Kočí, estas membro de redakcio de monata gazeto „Naša škola“, eldonata de ĉs. ŝtata eldonejo ktp.

Estas memkompreneble, ke ni esperantistoj unu- al- loke ŝatas la pri- kaj poresperantan laboron de dro Kamaryt, kies persista kaj celkonscia laboro rezultigis multajn sukcesojn de esperanto ne sole enlande sed ankaŭ eksterlande. Lia senriproĉa societa konduto kaj amika kunlaboro sukcesis ne sole kunveni sub la standardo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista ĉiujn laboremajn bonvolulojn, sed ankaŭ igi ĈAE tutŝtata reprezentanto de la esperantista movado en Ĉeĥoslovaka respubliko kaj grava faktoro en la esperantista movado internacia.

Ĉeĥaj esperantistoj deziras al dro Kamaryt okaze de lia 50-jara naskiĝtago multege da sano, feliĉo, pacienco kaj pluaj sukcesoj sur kampo esperanta, kiun li jam 33 jarojn diligente kaj sukcesplene pri- laboras.

Dr. A. Pitlík.

## Unuecigo de la organizo de Esperanto-movado kaj ni.

Dum la Kolonja kongreso reprezentantoj de la naciaj societoj, ilia Konstanta reprezentantaro kaj ICK kune kun UEA interkonsentis pri unuecigo de la internacia Esperanto-organizo. La interkonsento estis line akceptita de ĉiuj partianoj, en la ferma kongresa kunveno solene proklamita kaj subskribita de la ĉeestantaj reprezentantoj. La teksto estis nomigita „Interkonsento de Kolonjo“.

Laŭ ĝi de nun Universala Esperanto-Asocio estas la tutmonda organizaĵo esperantista, reprezentanta la E-movadon kaj organizanta la universalajn kongresojn. La landaj asocioj aligas ĉiujn siajn membrojn al UEA kondiĉe, se la asocio posedas organizan formon, kiu vidigas, ke temas pri la landa asocio neŭtrala, kaj se ĝi havas minimume cent membrojn.

Por ĉiu sia membro pagas la nacia asocio al UEA 0.50 svisajn frankojn (3.50 Kč). Por ĝi la membro ricevas la internacian membrokarton kaj rajton pri servopetoj (kuponaro). La landaj asocioj sindevigas varbi kiom eble plej multajn membrojn dezirantajn ricevi la jarlibron aŭ jarlibron kaj gazeton, kaj enkasigas la koncernajn aldonajn kotizojn. La ĝisnunaj membroj de UEA, ne apartenantaj al la landa asocio, povas resti membroj laŭ ĝisnunaj kondiĉoj ĝis fino de 1936. ICK, KR, UFE likvidos kaj transdonos siajn havaĵojn kaj dokumentojn. La nova komitato de UEA kaj la nova Centra Estraro fikso novajn devojn de la ĝisnunaj direktoroj kaj oficistoj de ICK kaj UEA. La landaj asocioj administras la membrojn en sia lando, laŭ la reguloj de la Centra oficejo, nomas ĉefdelegiton interkonsente kun UEA kaj delegitojn en interkonsento kun la ĉefdelegito.

La interkonsento de Kolonjo signifas finon de batalo pri reorganizo, kiu dum du jaroj malkvietigadis esperantistojn. En nia lando la situacio diferencis de multaj aliaj landoj. Ĉe ni estis ĉiam la kunlaboro inter UEA kaj nia Asocio tre bona kaj por ambaŭ komponantoj de la movado utila. Tial ĉe ni ne estis ia tro arda deziro por unuecigo. Ni ne estis kaj ne estas certaj, ĉu la unuecigo sukcesos kolekti rapide pli da mono ol la duopa sistemo. Sed ni kompreneble kunlaboros ankaŭ laŭ la nova skemo same fervore, kiom ni kunlaboris laŭ la malnova. Tial nia komitato decidis aliĝi al nova UEA per decido de la kunveno la 26. IX. 1933.

El nova skemo sekvas bezono nove aranĝi la kotizojn. Ĉar nova aranĝo ekvalidos de 1-a de novembro 1933, la afero estas neprokrastebla ĝis la regula ĝenerala kunveno. Tial ni kunvokis eksterregulan ĝeneralan kunvenon je la 9-a de decembro por konsiliĝi kaj decidi pri kotizoj por 1934.

La kunvenon ni uzos ankaŭ por aprobigi adaptigojn de nia statuto. Ni trovas momenton de internacia reorganizo tre taŭga por proponi al niaj ger-



**Dro Stan. Kamaryt.**

al la ĉs. ministerio por instruado kaj faris tie kelkajn intervenojn, kies rezulto estis la konataj ministeriaj decidoj pri la enkonduko de esperanto en la publikajn lernejojn kaj kreo al ekzamenaj ŝtataj komisaraj. En la j. 1921 li prezidis la XIII-an Universalan kongreson de esperanto en Praha.

Sed dro Kamaryt estas ankaŭ filozofia verkisto. Liaj verkoj „Mezinárodní jazyk“ (Internacia lingvo), „O dvoji pravdě“ (Pri duopeco de vero), „O jednoznačnosti mravního soudu“ (Pri unusenceco de morala propozicio) vekis merititan atenton. Lia esperantlingva „Filozofia vortaro“ estas eldonata. Krom tio li tradukas slovakingven, publikigas el psikologio kaj pedagogio, kunlaboris je Enciklopedia vortaro de Kočí, estas membro de redakcio de monata gazeto „Naša škola“, eldonata de ĉs. ŝtata eldonejo ktp.

Estas memkompreneble, ke ni esperantistoj unu- al- loke ŝatas la pri- kaj poresperantan laboron de dro Kamaryt, kies persista kaj celkonscia laboro rezultigis multajn sukcesojn de esperanto ne sole enlande sed ankaŭ eksterlande. Lia senriproĉa societa konduto kaj amika kunlaboro sukcesis ne sole kunvenigi sub la standardo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista ĉiujn laboremajn bonvolulojn, sed ankaŭ igi ĈAE tutŝtata reprezentanto de la esperantista movado en Ĉeĥoslovaka respubliko kaj grava faktoro en la esperantista movado internacia.

Ĉeĥaj esperantistoj deziras al dro Kamaryt okaze de lia 50-jara naskiĝtago multege da sano, feliĉo, pacienco kaj pluaj sukcesoj sur kampo esperanta, kiun li jam 33 jarojn diligente kaj sukcesplene pri- laboras.

Dr. A. Pitlík.

## Unuecigo de la organizo de Esperanto-movado kaj ni.

Dum la Kolonja kongreso reprezentantoj de la naciaj societoj, ilia Konstanta reprezentantaro kaj ICK kune kun UEA interkonsentis pri unuecigo de la internacia Esperanto-organizo. La interkonsento estis line akceptita de ĉiuj partianoj, en la ferma kongresa kunveno solene proklamita kaj subskribita de la ĉeestantaj reprezentantoj. La teksto estis nomigita „Interkonsento de Kolonjo“.

Laŭ ĝi de nun Universala Esperanto-Asocio estas la tutmonda organizaĵo esperantista, reprezentanta la E-movadon kaj organizanta la universalajn kongresojn. La landaj asocioj aligas ĉiujn siajn membrojn al UEA kondiĉe, se la asocio posedas organizan formon, kiu vidigas, ke temas pri la landa asocio neŭtrala, kaj se ĝi havas minimume cent membrojn.

Por ĉiu sia membro pagas la nacia asocio al UEA 0.50 svisajn frankojn (3.50 Kč). Por ĝi la membro ricevas la internacian membrokarton kaj rajton pri servopetoj (kuponaro). La landaj asocioj sindevigas varbi kiom eble plej multajn membrojn dezirantajn ricevi la jarlibron aŭ jarlibron kaj gazeton, kaj enkasigas la koncernajn aldonajn kotizojn. La ĝisnunaj membroj de UEA, ne apartenantaj al la landa asocio, povas resti membroj laŭ ĝisnunaj kondiĉoj ĝis fino de 1936. ICK, KR, UFE likvidos kaj transdonos siajn havaĵojn kaj dokumentojn. La nova komitato de UEA kaj la nova Centra Estraro fiksis novajn devojn de la ĝisnunaj direktoroj kaj oficistoj de ICK kaj UEA. La landaj asocioj administros la membrojn en sia lando, laŭ la reguloj de la Centra oficejo, nomas ĉefdelegiton interkonsente kun UEA kaj delegitojn en interkonsento kun la ĉefdelegito.

La interkonsento de Kolonjo signifas finon de batalo pri reorganizo, kiu dum du jaroj malkvietigadis esperantistojn. En nia lando la situacio diferencis de multaj aliaj landoj. Ĉe ni estis ĉiam la kunlaboro inter UEA kaj nia Asocio tre bona kaj por ambaŭ komponantoj de la movado utila. Tial ĉe ni ne estis ia tro arda deziro por unuecigo. Ni ne estis kaj ne estas certaj, ĉu la unuecigo sukcesos kolekti rapide pli da mono ol la duopa sistemo. Sed ni kompreneble kunlaboros ankaŭ laŭ la nova skemo same fervore, kiom ni kunlaboris laŭ la malnova. Tial nia komitato decidis aliĝi al nova UEA per decido de la kunveno la 26. IX. 1933.

El nova skemo sekvas bezono nove aranĝi la kotizojn. Ĉar nova aranĝo ekvalidos de post 1-a de novembro 1933, la afero estas neprokrastebla ĝis la regula ĝenerala kunveno. Tial ni kunvokis eksterregulan ĝeneralan kunvenon je la 9-a de decembro por konsiliĝi kaj decidi pri kotizoj por 1934.

La kunvenon ni uzos ankaŭ por aprobigi adaptigojn de nia statuto. Ni trovas momenton de internacia reorganizo tre taŭga por proponi al niaj ger-

### NIA TERMOMETRO:

	Por la jaro	1930	1931	1932	1933	1934
pagis dum la jaro:						
1930 . . . . .		172	117	1	—	—
1931 . . . . .		56	216	112	—	—
1932 . . . . .		2	13	253	65	2
1933 . . . . .		1	1	15	309	1
		<u>231</u>	<u>347</u>	<u>381</u>	<u>350</u>	<u>3</u>
Honora membro . . . . .		1	1	1	1	
Dumvivaj membroj . . . . .		3	3	3	3	
Stato de la membroj . . . . .		<u>235</u>	<u>351</u>	<u>385</u>	<u>378</u>	
El ili membroj de la Studenta Sekcio . . . . .		—	15	11	20	

El 378 pagintoj por 1933 estas 100 korporaciaj membroj, kies kotizo estas je Kč 6— malpli alta kompare kun tiu de 1932. Se niaj membroj ne atentos niajn senĉesajn alvokojn kaj admonojn, montros la konto de kotizoj senteban malkreskon de la enspezo. Ĉu vere estas malfacile oferi Kč 16— (izolulo) aŭ Kč 10— (pere de loka klubo — korporacia membro) por bono de la „sankta afero“?! Skl.

manlingvaj samideanoj kunfandigi la ĝisnunajn du, en nia lando amike kunlaborantajn naciajn asociojn, en unusolan. Tiel nia nova statuto ebligas kreon de sekcioj laŭlingvaj, kiuj estos aŭtonomiaj precipe pri propagando, turnante sin nacilingve al la publiko. Ni proponas ankaŭ ŝanĝon de nia nomo je „Ĉeĥoslovakia A. E.“ por montri jam en titolo, ke temas ne sole pri ĉeĥoslovakoj, sed ankaŭ pri germanoj, poloj, hungaroj k. t. p. La nova statuto ebligas per paragrafoj pri sekcioj ankaŭ al fakaj societoj, ke ili kunlaboru en unusola landa asocio korporacie, aŭtonomie kaj tamen komune.

Kompreneble ni uzos la okazon ankaŭ por modernigi nian statuton formale.

Niaj membroj kaj amikoj bonvolu rememori pri ĉiuj sugestoj, aŭditaj dum tempoj pasintaj kaj informi nin pri ĉiuj siaj deziroj kaj spertoj, por ke ni povu ilin uzi dum fina redakto de la nova statuto.

Stan. Kamaryt.

#### La IV. komitata kunveno

okazis la 13. IX. 1933 en Praha. Prezidis Dr. Pittlík. Daŭro de la kunveno: 20:30—23:45 h.

*Delegito al la Univ. kongreso:* Dr. Kamaryt pro personaj kaŭzoj estis malhelpita partopreni la kongreson en Kolonjo kiel oficiala delegito de ĈAE.

*Stacidomaj tabuloj.* S-o Ginz informis pri la ĝisnuna stato de la laboro. Estis dissendita cirkulero al 128 adresoj, nova admonilo al 74 lokoj. Decidite mendi 500 tabulojn, 297x420 m. S-o Ginz finarango la aleron.

*Ĉeĥoslovaka antologio.* S-ro Hromada raportis pri preparaj laboroj kaj proponis, ke estu nomita por tiu laboro lia helpanto, event. anstataŭanto. Decidite deklari, ke ĈAE garantias por ĝustatempa transdono de manuskripto.

*Vojaĝo de Kola Ajayi.* Kola Ajayi venos fine de novembro aŭ komence de decembro Ĉeĥoslovakion. Al eblaj interesuloj estis sendita informo cirkulero.

*Prelegon de Javano Mustafa Raden* ebligis ĈAE en Hradec Králové.

*Propaganda semajno.* Al la kluboj estis dissendita alvoko al partopreno en la propaganda semajno.

*Gazeta servo* ekspedis novan cirkuleron kun gazetnotoj kaj instrukciarion al la kunlaborantoj.

*Honoraj membroj de UEA* estis nomitaj: T. Čejka, R. Hromada, Dr. A. Pittlík, O. Skleněčka, J. Šupichová. ĈAE gratulas al ĉiuj.

#### La V. komitata kunveno

okazis la 26. IX. 1930 en Praha. Prezidis Dr. A. Pittlík. Daŭro de la kunveno: 20:30—23:40 h.

*Aliĝo al UEA.* S-o Dr. Pittlík raportis detale pri historio de la reorganiza alero de la Pariza ĝis la Kolonja kongreso, pri koncerna kunsido de UEA, KR kaj UFE en Kolonjo, pri akceptita „Interkonsento de Kolonjo“ kaj ĝiaj sekvoj por organizo de esp. movado en ĈSR kaj por ĈAE. Li priparolis sian projekton en la unua numero de „Bulteno“ kaj rilatantan al la reorganizo de ĈAE (resp. almenaŭ kreo al „Esperantista delegitaro de ĈSR“), centro, en kiu estus organizitaj ĉiuj naciaj, klasaj kaj fakaj societoj kaj esp. entreprenoj de ĈSR. Estis legitaj leteroj, senditaj de Dr. Kamaryt kaj Friedrich, koncernantaj la reorganizon de la movado ĉe ni. Post la debato estis decidite:

I. Akcepti la proponojn de s-o prezidanto: 1) aliĝi al nove organizita UEA laŭ „Interkonsento de Kolonjo“ kaj nomi Dron Kamaryt reprezentanto de ĈAE en nova komitato de UEA. 2) Pagi la kotizon por la jaro 1932. 3) Postuli de UEA, ke eventualaj pluaj aliĝoj el ĈSR (de naciaj kaj fakaj

societoj) estu antaŭ la akcepto ĉiam transdonataj por bontrovo al ĈAE, oficiala reprezentanto de esp. movado en ĈSR. 4) Kunvoki eksterordinaran ĝeneralan kunvenon je sabato, la 9. XII. 1933 al Praha. (Programo: Necesaj aranĝoj pro aliĝo al UEA kaj ŝanĝo de statuto.)

II. La proponon de s-o Janda, ke oni atentigu UEA, ĉu ne estus bone, ke laŭ punkto VIII de la „Interkonsento de Kolonjo“ estu de la komitato de UEA elektita plua membro de ĈAE kiel membro de UEA-komitato, ĉar multaj esperantistoj en ĈSR estos organizitaj ĝis la jaro 1936 senpere kaj ne havos voĉdonrajton — transdoni al la venonta komitata kunveno.

*Raporto de la kasisto:* Stato de la membroj — 378 — el ili 20 de la studenta sekcio. Ĝis la 25. IX. 1933 enspezoj Kč 6.896.70, elspezoj Kč 7.140.45, havaĵo Kč 9.756.25.

*Konferenco Wien—Budapest en majo 1934.* Dr. Karmarýt estis komisiita veturi Vienon por gajni informojn.

*Filozofia vortaro.* La propono de MEP pri aĉeto de 300 ekz. pro financaj kaŭzoj ne akceptita.

*Ekspozicia materialo* estis sendita al Ostrožské Předměstí.

### Stacidomaj tabuloj.

La samideanoj komprenis la signifon de tiu entrepreno kaj ĉiutage venas mendoj por novaj stacidomoj. Ni firme esperas, ke neniu grava loko mankos. Kelkajn ni atentigis per nova cirkulero, la ceterajn ni urĝe petas, ke ili nun plej rapide decidigu kaj mendu la tabulon, laŭ formulo en Bulteno n-ro 2.

Ni ripetas, ke post ricevo de 26 Kč (per blankopagilo al poŝtsparkasa k-to n-ro 9602 de Svaz československých esperantistů, Praha) ĈAE liveras la tabulon kun via adreso, zorgas pri ĝia likso en via stacidomo kaj antaŭpagas por ĝia lokigo ĝis fino de la jaro 1934. Venonte estas pagotaj sole 6 Kč ĉiujare.

Atentu ankaŭ la eblon mendi tiun tabulon por alia celo (sidejo de la klubo, loĝejo de UEA-Delegito k. a.). La tabulo sen adreso kostas 15 Kč afrankite.

Ni atendas de ĉiu grupo, ke ĝi konscios sia devo kapti la okazon por fari daŭran propagandon laŭ ĉi tiu unika maniero. Sed unuopaj samideanoj ankaŭ ne permesu, ke ilia stacidomo estu sen tabulo, kiu en brilaj koloroj dum jaroj varbos por nia afero kaj plifaciligos praktikan uzon de nia lingvo.

Kiu mendis, sed ne pagis ankoraŭ, tuj sendu la sumon.

En venonta Bulteno ni anoncos la lokojn, kiuj plenumis sian devon. Ne manku inter ili! O. G.

Atentigo al la senpacienuloj: La tabuloj venos en plej proksimaj tagoj el la fabriko, pentristo surpentros adresojn kaj dum venonta monato ĉiuj estos jam surloke. Alpagu 5—10 Kč, se vi ne anoncis plej koncizan adreson kelkvortan. La pentrado estas multtekosta afero.

### II-a prelegvojaĝo de negro Kola Ajayi.

*Al esperantistaj kluboj, delegitoj de UEA kaj al laboremaj unuopuloj en Ĉeĥoslovaka Respubliko!*

Sukceso de la I-a prelegvojaĝo de Kola Ajayi en ĈSR. (30 paroladoj) estis tiel granda, ke ni decidis inviti lin ankoraŭ unufoje en nian landon kaj organizi duan ciklon de liaj prelegoj, per kio oni plenumas interalie ankaŭ promeson, donitan antaŭ la tempo al tiuj lokoj, kiuj dum la unua prelegvojaĝo malfrue sendis siajn invitojn.

Malofte prezentas sin ebleco de tiel unika kaj konvinka propagando poresperanta, kiel tiu kun negro Ajayi. Tial ni esperas, ke niaj laborantoj ne malatentos kaj ne preterlasos la okazon, kiun ni donas al ili kaj kiu verŝajne neniam plu revenos.

Jen bezonaj informoj: S-ro Kola Ajayi el negro Joruba, el urbo Lagos en Nigeria (Okcidenta Afriko) paroladas kun lumbildoj pri sia „Sunhela patrujo“ kaj ĝia popolo. Estante bona tenoro, en dua parto de sia parolado li kantas en gepatra lingvo tipajn kantojn de sia gento. Parolado de s-o Ajayi estas interesa kaj instrua kaj taŭgas same bone por lernejoj kiel por vasta publiko.

**S-o Ajayi alveturos fine de novembro aŭ komence de decembro.** Kondiĉoj: Honorario por la unua parolado Kč 300.—, ĉiu plia aŭ lerneja parolado en la sama loko Kč 150.—, krom tio loĝigo kaj gastigo al s-o Ajayi dum la tagoj de lia restado en urbo. Honorario estas pagota antaŭe aŭ tuj post la parolado al nia Asocio. S-o Ajayi kunportas diapozitivajn vitrajn, formato 8.5x8.5 cm. En la paroladejo devas troviĝi projekcia aparato kaj lerta mekanikisto, kiu projekcios la lumbildojn. Proksimuman tekston de la parolado kaj de la kantoj vi ricevos post la invito, por ke la interpretisto povu sin antaŭprepari. Se vi presos aliŝojn, ni povos por malalta prezo liveri al vi matricojn, laŭ kiuj ĉiu presejo fandos kliŝon kun bela portreto de la paroladisto. La matricoj kostas Kč 3.— malgranda kaj Kč 5.— granda. Poŝtkartojn kun sia portreto vendas s-o Ajayi antaŭ kaj post la parolado kaj dum la paŭzo, helpe de iu bonvola samideano. Laŭdezire li ankaŭ donas aŭtogramojn. Ni tre rekomendas aranĝi ĉie la paroladon aŭ oni bonvolu ĝin proponi al loka kultura aŭ simila societo (Turista klubo). Certe ĝin proponu al lernejo kaj proponu vin funkcii kiel interpretisto. — Ĉiun korespondaĵon pri tiu ĉi afero bonvolu direkti al nia ĝenerala sekretario: Jaroslav Šustr, Praha I., Dlouhá tř. 53.

*Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.*

### Ĉeĥosl. gazetaro pri Esperanto.

Estos interese konstati, kiagrade aferoj, kiuj al ni ŝajnas gravaj, vekas intereson ĉe nia publiko kaj tial ankaŭ ĉe nia gazetaro. Estos utile, se ni lernos

tiamaniere rigardi nian movadon per neesperantistaj okuloj kaj ne estos maleble trovi tiel novajn vojojn por nia laboro.

Ni ĝoju ankaŭ, ke plimultiĝas gazetoj, en kies kolumnoj informoj pri esperanto regule aperas. Al la ĉiutagaj aldoniĝas la granda ĵurnalo *České slovo*. La legantoj de tiuj gazetoj ne hezitu sciigi la redakcion pri sia kontento. Ili montru tiel, ke ili scias pri sia rajto kundecidi pri la enhavo de sia gazeto.

Pri la dekjara laboro de la katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio ni legis en jenaj gazetoj: *Čech* 20. V.; *České listy*—Ml. Boleslav 26. V.; *Český západ*—Plzeň 8. VI.; *Hanácké listy*—Prostějov 3. VI.; *Hlas lidu*—Č. Budějovice 18. V.; *Lid* 20. V., 24. V.; *Lidové listy* 21. V.; *Lidový list*—Něm. Brod 18. V.; *Naše právo*—Boskovice 3. VI.; *Našinec*—Olomouc 25. V.; *Ostravský kraj*—Mor. Ostrava 10. VI.; *Pražský večerník* 24. V.; *Slovák*—Bratislava 21. V.; *Věstník katol. učitelstva*—Přerov 19. VI.; *Pravda*—Wien 1. VI. — Se ni konsideras, ke estis grandparte ne malamplaksa artikoloj (en la ĉiutaga *Lidové listy* 21. V. plena paĝo), ni devas konsenti, ke la katolikaj esperantistoj en nia lando estas en kontakto kun sia gazetaro.

Ke plaĉis la paroladoj de la negra samideano Hajaj, montras la gazetaj sciigoj en la diversaj lokoj. Ni raportis jam pri pli ol deko da artikoloj kaj nun sekvas nova kolekto laŭurbe ordigita:

Brno—*Lidové noviny* 10., 11. V., *Moravský přítel lidu* 9. V., *Svoboda* 9., 10. V., *Moravské noviny* 8., 11. V.; *České Budějovice*—*Hlas lidu* 24. V.; Hradec Králové—*Kraj královéhradecký* 24., 27. V., *Nová pochodeň* 11., 18. V., *Osvěta lidu* 6., 10., 17., 20., 24., 27. V., *Pochodeň* 10. V., *Rozhledy* 12., 19., 26. V.; Kladno—*Dělnické listy* 26. V., 9. VI.; Košice—*Buď připravený* 15. V.; Mladá Boleslav—*Več. Č. Slova* 17. V., *Mladoboleslavské listy* 27. V.; Moravská Ostrava—*Pondělník Č. Slova* 15. V.; Pardubice *Več. Č. Slova* 29. V., *Východočeský republikán* 26. V., 2. VI.; Plzeň—*Český deník* 29. IV., 5., 16., 23., 24. V., 10. VI., *Več. Č. Slova* 17. V., 6. VI.; Praha *Národní Politika* 23. V., *Letem světem* 11. VII.; Prešov—*Šáriš* 13. V.; Rimavská Sobota—*Gemer-Malohont* 13. V.; Uherské Hradiště—*Naše Slovácko* 5. V., *Slovácká domovina* 13. V., *Zájmy Slovače* 5. V.; Žatec—*Žatecký kraj* 26. V.

Gazetoj, kie ni trovis lastatempe regule esperantajn rubrikojn, angulojn, specialajn fakojn aŭ kursojn de la lingvo: *České Slovo* 26. V., 2., 9., 30. VI., 2., 9., 23., 30. VIII., *List říšského svazu čs. učitelů* 8. V., 8. IX., *Mladý svět* 13. VI., *Národní Politika* 13., 23. V., 15. VI., 8., 13., 21., 29. VII., 6., 12., 22. VIII., 13., 23. IX., *Občanské listy*—Nymburk 10., 24. VI., 1. VII., *Rozsevač* nro 8-1933, *Slníčko*—Turč. Sv. Martin nro 1—10-1933, *Večer* 22. V., 6., 19., 26. VI., 3., 31. VII., 7., 14., 21., 28. VIII., 4., 11., 18., 25. IX.

Kaj jen, kion ni vidis lastatempe en nia plej disvastigita ĉiutaga *Národní Politika* pri aŭ el esperanto: El esperanta mondo (vidu supre sub: Regulaj rubrikoj), Informoj pri esp. kunvenoj 18., 18., 19., 24. V., 13., 23. VI.; Kantistaj festoj en Estonio 19. V.; *Politika revuo en esperanto* 21. V.; Japana ministro kaj esperanto 22. V.; Negro paroladas en Ĉeĥoslovakio 23. V.; Tutpola kongreso esperantista 8. VI.; Nova esperanta gazeto 9. VI.; La forgesita poeto 13. VI.; Esperanto kaj lernejo 15. VI.; Plej granda tutmonda kantista manifestado 18. VI.; Libro, kiu estas ŝlosilo al tuta mondo 24. VI.; Vojaĝo de ĉeĥoslovaka esperantisto 28. VI.; Esperantokursoj en Arnhem 5. VII.; Kelkaj datoj pri jazo 12. VII.; Kiel perdiĝas primitivaj popoloj 15. VII.; Ĉu vi scias la devenon de tiuj ĉi vortoj 17. VII.; Pri minerala riĉeco de oriento 27. VII.; Propagando de turismo per hungara poŝto 9. VIII.; 25-a universala esperanto-kongreso 25. VIII.; La festoj de Pribina kaj la help-lingvo esperanto 11. IX., Esperanta gvidlibro tra Estonio 21. IX.

OG

## Kvin minutojn antaŭ la dekdua!

Aranĝantoj al diversaj esperantistaj entreprenoj, regionaj kunvenoj, rendezuoj, ekskursoj kaj similaj aranĝoj, ofte tre mallrue diskonigas la aferon aŭ dissendas la invitilojn, kaj poste ne estas mirinde, ke vizito al tiuj aranĝoj ne estas kontentiga. Kial Prahanoj tiom multnombre ĉeestis ekz.: Esperantotagon en Pardubice, kongreson en Olomouc, konferencon en Mladá Boleslav, ĝeneralan kunvenon de ĈAE en Hradec? . . . Ĉar la invitiloj venis longan tempon antaŭe, aŭ oni almenaŭ sciis precizan daton de okazonta aranĝo jam delonge. Dum klubaj kunvenoj oni multfoje la eblecon de komuna veturo priparolis, pridebatis, kaj oni varbis, kaj la rezulto estis vere ĝojiga. Sed se oni vendrede diskonigas en la Klubo aranĝon, kiu okazos jam la venontan kaj postvenontan tagon en loko 100, 150 eĉ 200 km malproksima, estas tre malgranda espero, ke oni iun varbos por la ekskurso. Oni ja ne povas tiel subite decidiĝi por veturo tiel longa.

Do karaj aranĝantoj al venontaj esperantaj renkontiĝoj: Bone memoru, ke ĝustatempe diskonigo de Viaj aranĝoj estas ĉiam nepre necesa. Sed se Vi venas kun viaj invitoj kvin minutojn antaŭ la dekdua ne kalkulu kun multaj partoprenantoj el lokoj malproksimaj!

Šustr.

## Radio.

Nuna ofteco de esperantaj disaŭdigoj el ĉeĥoslovakaj stacioj faras neeble en nia Bulteno raportiti pri ili tuj, kiam ili okazis. Sed estos certe utile havi kompletan liston de espo-disaŭdigoj. Ni hodiaŭ daurigas la enskribojn pri stacioj:

**Bratislava.** En j. 1932 prelegis „Pri la historio de l' slovaka popolo“ 6. I., 8. II., 7. III., 9. V. s-ro Emil Wanitsek. Duonhoretoj espo-lingvaj kun recita kaj kanta programoj, gviditaj de prof. Vl. Jukl, estis disaŭdigataj 22. XII., 23. I. 1933, 20. II. (temoj pribindaj), 26. VI. 1933 (temoj priskoltaj). La 6. IV. kaj la 11. VIII. 1933 prelegis s-ro A. Macek „Pri Pribina-festoj en Nitra“.

**Brno.** En j. 1932: IV. 17. IX-a Tutsokola kongreso — s-ino M. Strejčková. V. 31. ĈSR. historia skizo — s-ino M. Strejčková, prof. d-ro Hugo Traub. VI. 7. ĈSR. geografia skizo (s-ino M. Strejčková) s-ro Humpolák. 14. Ĉsl. sporto — s-ro Baďura, 21. Ĉeĥa literaturo; skizo pri ĝia evoluo — s-ino M. Strejčková, prof. Staněk, 28. La nuntempa teatro kaj filmo en ĈSR. — s-roj J. Šamla, D. Chalupa, Ježek. VII. 12. Turismo en ĈSR. — s-ro Barta, 19. Muziko en ĈSR. — s-ro Barta, 26. Industrio kaj komerco en ĈSR. ges-roj M. Strejčková, J. Šamla. VIII. 2. Božena Němcová, Avineto — s-ino M. Strejčková, 9. B. Smetana (kun gramofonaj diskaj) — s-ro J. Šamla, 16. Postrigardo al la IX. Tutsokola kongreso — Th. Kilian, 23. Pri la Masaryk-rondo apud Brno — s-ro Barta, 30. Intern. Esp-o Kongreso en Parizo — s-ro Barta. IX. 6. La lernejoj en ĈSR. — Th. Kilian, 13. Prelego el Welzl — s-ino M. Strejčková, 20. Popolaj tabeloj — s-ro J. Šamla, 27. Popolaj kantoj; parolis s-ro J. Šamla, kantis f-ino Zd. Trdák, 28. La 28. de oktobro — s-ro J. Šamla. IX. 13. D-ro L. Zamenhof — s-ro J. Šamla. XII. 16. Vidindaĵoj de ĈSR. — Th. Kilian, 23. Slov. popolaj kantoj kaj muziko — s-ro J. Šamla. — En j. 1933: I. 6. Sportejoj en ĈSR. — (s-ro J. Šamla), s-ro Ivan Čapek, 30. Supervido de okazintaĵoj dum 1932 en ĈSR. — s-ro J. Šamla. III. 6. T. G. Masaryk kiel filozofo — (Th. Kilian), D. Chalupa, 11. T. G. Masaryk kaj la junularo, legis s-roj J. kaj I. Blatný, 18. A. Dvořák (kun gram. diskaj) — s-ro Fr. Válka, 20. Internacia libertempejo en ĈSR. — s-ino M. Strejčková, 25. J. A. Komenský — s-ino M. Strejčková. IV. 1. Ĉu estas Jan Welzl mistifiko? — Th. Kilian, 8. J. Mahen (kun prelego el lia verkaro) — s-ro J. Šamla, 15. Nuntempa germana literaturo — s-ro J. Chlup, 22. L. Janáček (kun gram. diskaj) — s-ino M. Strejčková, 29. La sola cigana lernejo — Th. Kilian. V. 6. Kio nova en ĈSR? — s-ro J. Šamla, 13. El la nova ĉeĥa poezio — parolis s-ro J. Freund, rec. s-ro J. Šamla, 20. La Iratoj Čapek — s-ino M. Strejčková, 27. D-ro Ed. Beneš — s-ino M. Strejčková. VIII. 4. ĈSR. kaj la nuntempa Eŭropo — (Th. Kilian), univ. prof. d-ro F. Weyr.

(La gesinjoroj notitaj en la krampoj tradukis kaj legis la paroladon.)

(Daŭrigo.)

## Kroniko.

**Kunvenoj de nordbohemiaj esperantistoj.** La sesa okazis en Mikulov la 26. VI. sub prezido de prof. Max Murath. Estis akceptita lia propono, ke la nordbohemiaj laboru sub titolo „Amika Rondaro de Esperanto“. Kasistino de ARĚ estis elektita f-ino G. Grund el Teplice. La sepa kunveno okazis en Lom u Mostu la 24. IX. 33; ĉeestis ĝin 35 pers. el 15 lokoj, prezidis prof. Murath. La rondaro havas enregistritajn 40 personojn. Multe laboras en tieaj rondoj nia ano s-o L. Krisl, instruisto en Lom.

**Dua internacia libertempejo en Lázně Bělohrad** finiĝis kun vere morala sukceso. Dum du monatoj vizitis ĝin pli ol 70 samideanoj, inter ili 7 eksterlandanoj. Ĉiuj gastoj forveturis kun tre belaj rememoroj. Dum daŭro de la libertempejo oni aranĝis paroladon (prez. Linke) pri esperanto antaŭ ĉ. 180 pers. kaj solenan artistan akademion, aranĝitan de s-o Šamla. Banloka gazeto „Lázně Bělohrad“ en ĉiu numero enhavis esp-oanguleton. Komenciĝis du kursoj, entute por 55 pers., gviditaj komence de s-ino Strejčková, poste de s-o Fasce (Genova):

## Lokaj informoj.

**Esperantista Klubo en Praha.** Pasinta somero estis tre riĉa je vizitoj de fremdaj kaj fremdlandaj esperantistoj. Ni havis ofte okazojn audi ilin kaj paroli kun ili dum tutaj vesperoj. Plej ofte oni renkontadis gesamideanojn el Germanujo. Ili estis elmigrintoj, kiuj devis forlasi sian patrujon.

18. VIII. paroladis malaja esperantisto Haĝi Mustafa Raden el Java insulo. Al Prahanoj li estis bone konata de du aliaj paroladoj, kiujn li foje havis en la Klubo. Nuna lia parolado temis pri orientaj moroj, kutimoj, familia vivo, pri virino, ŝiaj taskoj kaj pozicio, pri viro kaj lia laboro, pri la kvar lingvoj javanaj ktp. Parolado de s-o Raden estis zorgeme auskultata kaj post la parolado vigle pridebatata.

25. VIII. Vere internacia kunveno: Ĉeestis gastoj el Hispanujo, el Italujo, el Germanujo, el Nederlando kaj el kelkaj lokoj ĉeĥoslovakaj (Brno kaj Vrchlaby). Kunvenon vizitis ankaŭ ĵus el sia usona vojaĝo reveninta vicprezidanto de ĈAE Dro Aŭg. Pitlík, kiu rakontis pri siaj impresoj el tiu ĉi granda vojaĝo. Parolis ankaŭ ĉiuj gastoj kaj tiel la kunveno en bona humoro plilongigis ĝis meznokto.

1 IX. prezidanto de la Klubo s-o Šustr donas detalan raporton pri la XXVa kongreso en Kolonjo kaj pri ĝiaj rezultoj rilate al multfoje jam preparolita reorganiza problemo. Post lia parolo germana esperantisto rakontas pri nuna situacio en Germanujo kaj pri kialoj, pro kiuj li preferis forkuri el sia patrujo.

8. IX. Alia Germano rakontas pri suleroj, kiuj fine lin igis forkuri Ĉeĥoslovakujon, kaj nederlanda samideano s-o Heinze el Utreĥt, konata al plimulto de geĉeestantoj persone, salutas la kunvenon kaj rakontas pri siaj vojaĝoj en Ĉeĥoslovakujo.

15. IX. vizitis la kunvenon pastro Font Giralt, konata oratoro kaj prezidanto de IKUE. Li rememoras sian lastan viziton al la Klubo, entuziasme parolas pri ĝi kaj pri sia amo al Ĉeĥoslovakujo. Sian parolon li finas per vortoj: „Se ankoraŭ unufoje mi venus sur tiun ĉi mondon, kaj se mi rajtus elekti patrinon, kiun mi elektus? Kompreneble la malnovan! Se mi rajtus elekti patrujon, kiun mi elektus? Kompreneble ree la malnovan — kaj se mi ne plu povus elekti la malnovan patrujon, do mi certe elektus la ĉeĥoslovakon! Finon de la vespero oni plenis per tradukado de zamenhofaj neologismoj, kiujn oni ĉerpis el biblio.

19. IX. okazis komitata kunveno de la Klubo, dum kiu oni faris gravajn decidojn pri esperanto-semajno kaj pri malfermo de du kursoj.

22. IX. prezidanto de la Klubo s-o Ŝustr parolas pri Cionista kongreso, kiu antaŭ nelonge okazis en Praha. Li komparas ĝin kun kongresoj esperantaj, sopiras pri baldaŭa efektivigo de Universala Esperanto-Kongreso en Praha, kaj riproĉas hebreajn esperantistojn, ke ili nenion faris por propagando de Esperanto inter hebreoj dum la cionista kongreso. Sekvis vigla debato, dum kiu s-o Weisskopf detale klarigis diversajn demandojn kaj riproĉon de s-o Ŝustr, dirante, ke hebreoj propagandas nun inter hebreoj sian hebrean lingvon, kiu estos ilia nacia lingvo. Estus do malfacile propagandi al ili iun plian lingvon nun, kiam ili ne ĉiuj ankoraŭ parolas la hebrean.

29. IX. Ampleksa referato de kluba prezidanto pri diversaj novaĵoj kaj aktualaĵoj el mondo esperantista: Stockholma kongreso, eksterordinara ĝen. kunveno de ĈAE, filozofia vortaro de Dro Kamaryt, sukcesoj en Egiptujo, venonta kongreso en Praha, malfermo de du kursoj kaj propagando por ili, dua prelegvojaĝo de negro-samideano Kola Ajayi ktp. Komence de la kunveno li rememoris mortintan samideanon Fox, pri kies morto sciiĝis la Klubo nur post la enterigo.

4. X. okazis malfermo de la kurso por komencantoj. Kurso okazas en lernejo „u sv. Havla“. Instruas ŝtate ekzamenita instruisto s-o Francisko Staněk, vicprezidanto de la Klubo.

6. X. okazis malfermo de kurso por progresintoj. Instruis s-o Staněk. Partoprenas 15 personoj. Tiutagan kunvenon ĉeestis estona mondmigranto s-o Kritschmann, kiu rakontis pri siaj vojaĝoj tra 4 kontinentoj. Post la deka horo oni komune aŭskultis radio-horeton disaŭdigatan el Brno.

10. X. dua malferma leciono de kurso por komencantoj. La kurson vizitas 25 gelnantoj. of.

**Bakov n. Jiz.** La 11. X. 33 komenciĝis nova kurso por komencantoj en klubejo. La klubo (16 membra) la 13. VIII. 33 aranĝis ekskurson al Bezděz kaj Doksy.

**Betliare.** Kurso por komencantoj en septembro 1933 gvidita de s-o Tibor Bobula havis tiom da aliĝoj, ke necesis dividi ĝin je du partoj. (Laŭ Ŝafarikov kraj, 9. IX. en Rožnava.)

**Bratislava.** S-o redaktoro Nikolao Hovorka, eldonanto de tre bona revuo „Berichte zur Kultur- und Zeitgeschichte“ en Wien, vizitis la 24. V. la klubon, por fari prelegon pri „Aktualeco de nia movado por samtempa kulturo“. La prelego tre enhavoriĉa kaj tre interesa estis atente aŭskultita de ĉiuj ĉeestintoj. Saman plaĉon trovis la originalaj poemoj de s-o Hovorka, kiujn li laŭlegis post la prelego. La klubo dankas lin publike pro la oferemo, kun kiu li nin vizitis.

**Bratislava.** Kurso por komencantoj en la klubejo de post 10. X. 33 ĉiujn mardon kaj merkredon gvidata de s-o E. Wanitsek, por 9 pers.

**Horní Litvňov.** Kurson, gvidatan laŭ rekta metodo, malfermis kaj gvidas delegito de UEA s-o Ant. Slanina. Pliajn kursojn li projektas en Záluží kaj Souš.

**Hradec Králové.** Publika kurso komenciĝis la 18. IX. 33, gvidata de s-o Sklenčka laŭ Gaja lernolibro, por 15 pers. La 18. X. la klubo aranĝis paroladon de Dr. A. Pittlík, pri la ekspozicio en Chicago, kun granda sukceso. Merkredajn kunvenojn vizitas ĉiam 12—16 personoj. En ĉiu kunveno oni lotumas sekrete nomojn de la partoprenantoj kaj du anoj tiel elektitaj per vera hazardo, havas la devon en la plej proksima kunveno prezenti legadon, paroladon, reciton: treege bonan impreson faris la provoj de la komencantoj.

**Mladá Boleslav.** Aŭtuna kurso por komencantoj malfermita la 4. X. 33.

**Prostějov.** Novan kurson por geskoltoj, kiun vizitas 25 pers., de post septembro 1933 gvidas s-o Heikenwälder, laŭ lernolibro de Kilian.

**Železník.** La 11. IX. 1933 komenciĝis la dua esperanto-kurso kun 26 partoprenantoj, plejparte la boristoj, ankaŭ oficistedzinaj kaj kelkaj infanoj, Ĉar la kursanaro estas slovaka kaj hungara, estas uzata lernolibro de Privat. Oni instruas dufoje semajne. Kursgvidanto s-o Lad. Czibur.

## Informoj.

**Grava atentigo!** Il-a prelegvojaĝo de negro Kola Ajayi, kiun ni en cirkulero anoncis por fino de oktobro, okazos nur fine de novembro aŭ komence de decembro. Grandaj sukcesoj en balkanaj ŝtatoj kaj ekmalsaniĝo de la paroladisto malluigas pli iruan alvenon de Ajayi.

**Ŝtataj ekzamenoj pri esperanto** okazas inter la 6.—23. XI. 1933 en Praha.



**Lektorato de esperanto** ĉe la politeknika altlernejo en Praha malfermis siajn prelegojn 25. X. 1933. Prelegas lektoro dro Pitlšk.

**Paroladon publikan de dro Pitlšk pri la ekspozicio en Chicago** aranĝis interalie 11. X. Esperantista klubo en Mladá Boleslav, 18. X. Esp. kl. en Hradec Králové. La 12. XI. ĝi estas aranĝota de Esp. kl. en České Budějovice.

**Vicprez. de ĈAE dro Pitlšk**, reveninte el Usono, dankas elkore al ĉiuj, kiuj rememoris lin okaze de lia 50 jara naskiĝtago. Precipe li dankas al la redakcioj de „Bulteno“, „Ligilo“, „Esperanto“ kaj „Heroldo“ por tiurilataj artikoloj, rekonantaj lian ĝisnunan poresperantan laboron, al UEA pro la nomigo honora membro, al I.C.K., ĉeĥosl. kaj eksterlandaj esp. kluboj kaj opuloj por la sinceraj deziresprimoj.

**La Pribina-festoj** estis uzitaj de ĉeĥoslovakaj esperantistoj por informi en rimarkinda amplekso fremdlandan publikon pri la plej malnova epoko de nia historio. En Espero katolika 1933 aperis longa informa artikolo de s-ro A. Macek. En Heroldo de Esperanto 6. VIII. 1933 estis artikolo „Festoj de Pribina en Nitra“ de s-ro A. Jandfk. La Komitato de Pribina-festoj en Nitra eldonis belan broŝuron 16 paĝan, kompilitan de D-ro Stan. Kamařyt „Unua slovaka kristana princo“, kiun ĝi dissendigis laŭ adresoj de la Jarlibro fremdlandon. Ĝestis sole malmultaj ekzempleroj, kiujn ni ricevis de la eldoninto kaj disponigas ilin al enlandaj kolektantoj kaj interesantoj. Ili povas ĝin ricevi de ni por 1 Kč afrankite. Mendu ĝin tuj, ĉar la provizo estas minimuma.

**Klubaj bibliotekistoj!** Estos grave por via biblioteko, ke ĝi posedu kompletan kolekton de nia Asocia Bulteno. Ĉar verŝajne ne ĉiu membro volas konservi siajn ekzemplerojn, ni konsilas peti iun el la membraro donaci sian ekzempleron por la kluba biblioteko. Se tiu ĉi solvo ne estas dezirata, ni estas pretaj liveri tiun ĉi jarkolekton por biblioteko kluba por pago de 7 Kč. Sed ni nepre rekomendas al ĉiuj samideanaj grupoj, ke ili zorgu, ke ilia biblioteko posedu kompletan kolekton de la Bulteno.

**Esperantista vivo.** Josef Vondroušek, nia komitatano en Brno, edziĝis kun f-ino Milada Ondráčková, la 22-an de oktobro 1933. Niajn sincerajn gratulojn!

### Niaj mortintoj.

S-ino *Františka Šupichová*, patrino de f-ino Julie Šupichová, mortis la 8. VIII. 1933 en Červený Kostelec.

Laŭ reveno de la Bulteno ni eksciis pri la morto de s-ino *Emilie Najmanová* en Jičín.

La 23. IX. 1933 mortis bona homo kaj fidela membro de nia Esperanta familio s-ro *Vinc. Reichelt en Mladá Boleslav*. La mortinto naskiĝis en Praha 21. VIII. 1891 kaj studis tie. Depost la jaro 1919 li estis funkciulo de ĉs. popola partio kaj redaktoro de la gazeto „České Listy“. Estas kompreneble, ke li ne povis preteriri nian movadon, kies ideoj estis konformaj kun lia tuta naturo. Baldaŭ li lernis esperanton kaj poste kun sia tuta animo li diligente partoprenis laborojn de la E. K. en Ml. Boleslav, kiu post multjara paŭzo denove komencis en la jaro 1931 sian agadon.

La mortinto, kiel komitatano de nia Esperantista klubo kaj kiel konvinkita samideano, partoprenis en ĉiuj niaj laboroj, ankaŭ kiel redaktoro de loka gazeto „České Listy“. Kion ĉi tio signifis por nia loka movado, tion ni Boleslav-anoj scias plej bone. Jam nun, dum preparado de nova aŭtuna kurso ĉie al ni mankas nia laborema redaktoro. Lia bonhumora koro jam ne batas. En la kunvenoj jam ne sonoros lia fervora voĉo kaj lia bonkora humoro ne plu spicigos kluban laboron. „Kara samideano, eĉ dum via dolorplena morto vi ne forgesis nian movadon kaj ni promesas, ke ni ĉiam sekvos vian bonan ekzemplon. Ni ne forgesos“.

*Esperantista klubo en Mladá Boleslav.*

Nian klubontrafis granda dolorplena bato. Nia multjara prezidanto, s-ro *Václav Brož*, grandkomercisto kaj konsilisto de la komerca ĉambro en Praha, ano de multaj humanecaj societoj, mortis neantendite la 25. IX. 1933 nur 49 jara. La enterigo okazis la 28. IX. 1933. La klubo metis sur la tombon florkronon kun la surskribo: Al sia amata prezidanto Esperantista klubo en Kladno.

S-ro Brož jam antaŭ la mondmilito kaj ankaŭ dum nuna mallacila tempo fervore laboris por nia kara Esperanto — malgraŭ siaj grandaj zorgoj privataj. Li estis ano de kelkaj esperantistaj organizaĵoj i. a. de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista kaj de U. E. A. La samideanoj el Kladno ĉiam memoros lin.

*Esperantista klubo Kladno.*

Al iliaj parencoj ni sendas esprimon de la kora kompato.

### Ricevitaj libroj.

**Cankar:** „*Servulrajto*“, prilaboris en versoj Dro J. Stefanĉič. Formato 12x20, pĝ. 68, eldonis „La suda stelo“, Slavonski Brod (Jugoslavio). Arta fotomuntaĵo speciale por la esp. eldono. Prezo: ĝis 30. X. 1933 sv. fr. 1.50, poste 2 sv. fr., aŭ naŭ internaciaj respondkuponoj.